La Brita Esperantisto

Novembro-Decembro 1985

La Verda Stelo
16 Aŭgusto '85

La ĉiujaran ceremonion, meti florkronon sur la verda stelo de la trinkejo "Verda Stelo" en Stoke-on-Trent, okazis ĉijare la 16an de aŭgusto. De maldekstre: D-rino M. Boulton, D-ro P. Neergaard, William Auld, William Simcock.

La

Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST

ELDONAĴO DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO

81/A Jaro, N-Ro 867 Novembro-Decembro 1985

Eldonas:
ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO, 140 Holland Park Avenue, LONDON W11 4UF. Tel. 01-727-7821

Redaktoro:
WILLIAM AULD
20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando FK14 7HG

Reklamoj: £20 por tuta paĝo, kaj samtarife (plus 15%) ĝis okona paĝo. Unu senpaga el tri.

Nek la Asocio nek la Redaktoro respondecas pri la personaj opinioj esprimitaj de kontribuintoj al la revuo, kondiĉe ke la esprimoj ne estas kontraŭleĝaj.

UK ISSN 0007-067X

La jara kotizo por EAB – aliĝu en iu ajn monato – estas £10.00 (£6.00 se malpli ol dek-ok-jara). Anoj ricevas la du gazetojn 'Esperanto News' kaj 'La Brita Esperantisto'. Abono nur al "La Brita Esperantisto" estas £5.00 jare sen aneco.

Perpoŝtaj korespondaj kursoj estas haveblaj en stadioj I, II, 'intensive' kaj Altgrada, ankaŭ ekzamenoj. Petu detalojn kaj prezojn ĉe Esperanto Centre, 140 Holland Park Ave., London W11 4UF – kun afrankita mezgranda koverto.

Form of Bequest

I ..... give and bequeath (free of duty) to Esperanto-Asocio de Britujo whose present address is 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, the sum of £..... to be used for the general purposes of such Association. And I direct that the receipt of the Secretary for the time being of the Association shall be a sufficient discharge to my Trustees for such a legacy.

ESPERANTO EN INTERNACIA KONFERENCO

Kiam prof. Lalage Bown el Glasgovo, same ĉarma kiel eminenta, komencis anglalingvan prelegon pri tridekjara spertado pri adolta klerigado en pluraj afrikaj landoj, per la vortoj "Mi estas krokodilo", ŝi tuj karigis sin al esperantistoj el Aŭstralio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio (origine), Danio, Francio, Germana Federacia Respubliko, Indonezio (origine) kaj Nederlando, kiuj partoprenis konferencon en Wedgwood Memorial College, Barlaston, de la 17-a ĝis la 23-a de Aŭgusto, pri "Internaciaj Aspektoj de Adolta Klerigado – Lingvo kaj Internacia Interkomprenigo". Sed, poste, Prof. D-ro Paul Neergaard, kies larĝvida kaj potenca menso konceptis la tutan planon de la konferenco, klarigis, ke en tiu konferenco oni ne povas krokodili, ĉar ne temis pri "esperantista konferenco" sed pri "faka konferenco, kies ĉefa laborlingvo estas Esperanto". Kaj ĝi brile montris la adekvatecon de Esperanto por io tia.

Prelegis angle, do, Lalage Bown; Sir Charles Carter, kies prelego pri "mitoj kiuj disigas" en Norda Irlando estis, kredeble, tiel ekvilibra kaj objektiva, kiel iu ajn prelego pri tiu afliktita lando povus esti – kaj kiun *Times Higher Educational Supplement* detale raportis; D-rino Kathleen Hall pri problemoj kaj limoj de lingvolernado, el multjara spertado en universitatoj; kaj Derek Tatton, estro de la Kolegio, pri dilemoj pri objektiveco kaj ideologioj en klerigado de adoltoj. Kvar postprelegaj diskutoj tial uzis la anglan kaj Esperanton, foje kun interpretado. Sed, kvankam ĉiuj konferencanoj almenaŭ iom scipovis la anglan, kelkaj videble sentis siajn malavantaĝojn, kaj la aliaj diskutoj, tute en Esperanto, fluis plĭ facile; la homoj diskutis pli egale kaj detale.

En la franca lingvo salutis per longa telegramo Amadou Mahtar M'Bow, Ĝenerala Direktoro de UNESKO, kiu emfazis la valoron de Esperanto por paco kaj por la egalaj rajtoj de ĉiuj lingvoj; kaj Prof. H. L. Elvin, eks-direktoro de la Kleriga Fako de UNESKO, pene vojaĝis el Kembriĝo por la inaŭguro kaj faris la ĉefan paroladon – kiel veterana kaj konvinkita esperantisto, kaj en bela polurita Esperanto. Gaston Waringhien ankaŭ salutis, per ĉarma letero.

La programo estis riĉa, streĉa kaj varia; kaj, kun la supraj esceptaĵoj, preskaŭ tute en Esperanto. Prof. Stanley Nisbet prelegis dufoje; iom ĝenerale pri adolta klerigado, kaj pli detale pri la problemoj de klerigado de tiuj, kies hejmaj lingvoj ne estas la nacia lingvo. Pri tio okazis unu el la plej viglaj diskutoj, pro la nuna multrasa socio en Britio mem kaj alilande. La temo de William Auld, "Kulturo nacia kaj kulturo internacia", tre stimulis pensadon pri la vera difino de kulturo; Auld emfazis la emocian flankon de kulturoj, la artefaritecon, kaj la motivojn por malamo inter kulturoj; sed ekzistas jam pluraj kulturoj supernaciaj. Prof. D-ro Ivo Lapenna prezentis alian teorian analizon, kun la oratora eminenteco kiun ĉiuj atendas de li, sub la titolo "La Solidara Rolo de la Internacia Lingvo", emfazante la valoron de Esperanto kiel lingva esprimo de "humaneca internaciismo", dum aliaj lingvoj iom fremdigas homojn unu de la alia. Du prelegoj ne ĉiel konsentaj, sed valore komplementaj kaj vere elokventaj. Du prelegoj de Paul Neergaard donis amason de pensigaj kaj foje malkvietigaj informoj pri problemoj de klerigado en la Tria Mondo surloke, kaj de klerigado de stipendiuloj el la Tria Mondo en Europo. (Iom ŝoka al britoj estis la skalo de helpo al la Tria mondo el malgranda Danlando, kompare . . . Sed konsola estis neforgesebla bildo pri Neergaard instruanta hindan bovinon pri sempatologio . . .) Prof. Helmar Frank

parolis pri la internacia lingvo por sciencistoj, kies lingvaj bezonoj estas specialaj; kaj pri la nuntempe konsiderinda evoluo de la uzado de Esperanto, ekzemple por resumoj, en fakaj konferencoj kaj en la Akademio de Sciencoj en San Marino; aktualaj direktoj en kibernetiko eble helpos la progreson de Esperanto en sciencaj medioj.

Tiun lastan punkton pli detale diskutis Alex Olde Kalter, specialisto pri la duon-aŭtomata traduka sistemo, uzanta Esperanton kiel pont-lingvon, tre tempoŝpare, por maŝina tradukado, pri kiu oni jam povis iom legi en *Esperanto*. Olde Kalter lernis Esperanton ne pro "Movadaj" motivoj, sed kiel fakulo por kiu ĝi povas esti grava ilo; parolis flue kaj ĉarme, klarigis la gravecon de la nunaj esploroj – kun granda kompetenta stabo kaj bonaj financaj rimedoj – tiel ke li kaj prof. Frank kune vere donis esperojn pri nova stadio en la evoluado de Esperanto en nia komputera epoko. Kvazaŭ ĉe alia ekstremo de praktika uzado, Norman Williams rakontis pri Esperanto kiel iom kleriga kaj stimula fako de instruado en malliberejoj; Marjorie Boulton prelegis pri klerigo de aŭtodidaktoj kaj izoluloj, ekzemple pri filantropiaj kaj komercaj korespondaj kursoj kaj la brita Malfermita Universitato; kaj menciis la specialan taŭgecon de Esperanto kiel lingva studtemo por izoluloj kaj emeritoj.

D-rino Magda Šaturová prelegis pri instruado pri tradukarto en Ĉeĥoslovakio, kaj pri dumviva klerigado per legado de monda literaturo, emfazante la studadon de la kulturo de malgrandaj nacioj kun minoritataj lingvoj. Ŝi kaj ŝia edzo D-ro Frank Šatura multe kontribuis al la diversaj diskutoj; la ĉeesto de tiel indaj reprezentantoj de orienta Europo diversigis vidpunktojn kaj pliigis komprenojn. Ankaŭ la du simpatiaj azianoj, kvankam ili nuntempe loĝas en Eŭropo, alportis plurajn interesajn ideojn el ne-eŭropaj vivospertoj. Estas notinde, ke, kvankam dum la kutime tre viglaj diskutoj montriĝis multaj diversaj opinioj kaj okazis tre multaj demandoj, la tuta etoso de la konferenco ĉiam restis amika, tolerema, sciiĝema.

La konferencanoj estis afable akceptitaj en la Universitato de Keele, kie ili vidis la historie interesan, kaj imponan, originan domegon, kaj povis iom vagadi sur bela universitata tereno; la vicregistristo de la universitato parolis tre interese – kun esperanta traduko, kiu por la konferencanoj estis normala afero, sed verŝajne sufiĉe impresis *lin*, precipe ĉar en Esperanto estis eble uzi terminaron de universitataj aferoj!

Dum la tuta konferenco (kaj dum monatoj antaŭ ĝi) Derek Tatton, la kolegiestro, konstante kunlaboradis pacience, praktike kaj tre bonhumore; kaj multaj komentis pri la kvanto kaj kvalito de la manĝoj kaj la afableco de la stabo. S-ro Tatton nun serioze studas Esperanton kaj jam iom uzas ĝin praktike; li aranĝis etan ekspozicion en la kolegia biblioteko de la esperanta fako tie. D-rino Hall ne nur faris streĉan kaj malfacilan protokoladon dum la diskutoj, kaj ĝenerale helpadis multajn, sed prizorgis la librobudon – kaj ĉijare en Barlastono vendis esperantajn librojn ĝis la valoro de pli ol £466!

Tia programo de prelegoj nepre necesigis kelkajn horojn pli distrajn; Margaret Livingston prezentis ravan recitalon de skotaj kantoj en tradukoj de Auld, Rossetti kaj aliaj; legado de aliaj poemoj pligrandigis tiun programon. Dum la fina vespero, la ĉeĥoslovakaj geedzoj bonege prezentis antologieton de slovakaj poemoj, kaj, kun helpo de kelkaj britoj, slovakaj kantoj; ni ankaŭ lernis indonezian kanton kaj amuzan mimiko-dancon; kaj prof. Nisbet instruis skotan kanton. (Kaj, post tre serioza kaj iom streĉa semajno, ne mankis finfine iom de sana frivoleco, eĉ ĉe kelkaj sufiĉe eminentaj personoj . . .)

Dum la lasta forumo, kiun prezidis d-ro Neergaard, oni diskutis pri la ebleco eldoni modestan libron de la prelegoj kaj diskutoj; tion oni nun provizore

redaktas.

Eble nur mi, kiu plejparte respondecis pri la detala organizado de la konferenco, scias ĝuste kiom da sinoferoj okazis, por ebligi tiun konferencon; mi flustru nur, ke preskaŭ ĉiuj prelegantoj *perdis* finance per sia ĉeesto, kaj pluraj ĉeestis en tre malfacilaj cirkonstancoj; fervojistaj strikoj, inter aliaj obstakloj, kaŭzis diversajn ĝenojn. Sed en la fino, ĉiu ŝuldis dankon al ĉiuj por sukcesa, neordinara, kaj prestiĝa konferenco, kiu estis inspira ekzemplo de kunlaborado kaj sinceraj interŝanĝoj de elpensitaj opinioj kaj esploritaj informoj.

Marjorie Boulton

TRADUK-KONKURSO

Baldaŭ estos eldonita de UEA nova informlibro pri Esperanto, verkita de William Auld sub la titolo "La fenomeno Esperanto". Unu celo de la eldono estas, ke la libro estu tradukita en laŭeble multajn naciajn lingvojn, kaj jam eĉ antaŭ la eldono de la originala teksto oni en pluraj landoj interesiĝis pri tia tradukado. Ni ankoraŭ ne scias, ĉu aperos ankaŭ angla traduko. Sed ni invitas niajn legantojn traduki en la anglan la sube presitan specimenon el la libro. Temas pri ĉerpaĵo el tiu sekcio, en kiu Auld komentarias la 16 regulojn de la Fundamento. Ni donos libropremion al la sendinto de la plej trafa traduko. La tradukojn oni sendu al la redaktoro de la BE. Limdato: la 20a de januaro 1986.

15. *La tiel nomataj vortoj* fremdaj, *t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.*

Kiam ĝi estis eldonita en 1887, la lingvo havis malpli ol 1,000 radikojn – kvankam kompreneble per tiu materialo oni disponis pri vortprovizo multe pli ampleksa. Tiu stoko rapide pligrandiĝis (kiam eldoniĝis la unuaj vortaroj, kaj ankaŭ la unuaj literaturaj verkoj), kaj daŭre pligrandiĝas hodiaŭ.

Estas fakto, ke – precipe sur kampoj sciencaj kaj teĥnikaj – la lingvoj de la mondo posedas ampleksan terminaron pli-malpli komunan, kaj tiaj terminoj povis senĝene akceptiĝi ankaŭ en Esperanto. Fizikistoj kaj psiĥologoj, inĝenieroj kaj juristoj, ktp, povis rapide starigi siajn fakterminarojn sur tiu bazo.

La averto de Zamenhof, ke oni enkonduku nur vorton fundamentan (kiu do estu radiko, el kiu oni formu la ceterajn vortojn) estis tre sagaca, sed ne ĉiam atentata. (Kiam el *redakt-* oni formas *redaktisto*, ĉu necesas *redaktoro*, ktp?).

Bedaŭrinde la regulo malfermas ankaŭ aliajn pordojn, malpli bonvenajn. Tre multaj anglalingvaj vortoj eniris aliajn lingvojn (la francan, la rusan, eĉ la japanan, ktp), kaj fariĝis certagrade internaciaj: *striptizo, buldozo, nokaŭti, handikapita,* k.s. El tio estas simpla paŝo eniri ankaŭ en Esperanton, sub egido de la 15a regulo.

Ĉu tiel terure? Nu, jes kaj ne. *Buldozo* estas eble bona; se por la aliaj mi preferas: *incitnudiĝo, senkonsciigi, malavantaĝa,* ĉu eble tio ne estas ia ekscentra prefero flanke de maljuna konservativulo?

La problemo estas, ke tiu abunda angligo de la vortprovizo (kiu tamen okazas en pli forta grado en tre multaj naciaj lingvoj) ja subfosas la ĉefan avantaĝon de Esperanto kiel lingvo *efektive* internacia – ĝian vortkonstruan karakteron surbaze de relative malmulta kaj facile akirebla radikaro. Se Esperanto fariĝus tiel malfacila kiel la angla lingvo, kial preferi Esperanton?

16. *La fina vokalo de la substantivo kaj*

de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭata de apostrofo.

Venis jam tempo emfazi kaj substreki la fakton, ke Zamenhof estis poeto kaj literature kultura homo. Pravas kaj gravas la konata sentenco de Kalocsay: "Kaj vere, oni povas diri, ke ne per Esperanto li faris poezion, sed per la poezio li faris Esperanton". Se tiu aserto ŝajnas al iuj legantoj maltrafa aŭ superflua, ili pripensu du fundamentajn faktojn:

(i) La metio de la poetoj kaj la literaturistoj ĝenerale estas la lingvo, kiun ili disponas. En ĉiuj lingvoj estas rekonate, ke tiuj metiistoj kreas la ĉefajn glorojn, la plej subtilajn kaj esprimivajn formojn, de la koncerna lingvo. Dum la dek jaroj de pretigado, kiujn Zamenhof dediĉis al Esperanto, lia celo ĉiam estis, ke ĝi kapablu reprodukti la verkojn literaturajn de aliaj lingvoj, verkojn de ekzemple Heine, Schiller, Anderson, la Biblio, k.a. Ne kodon li volis krei, sed plenkapablan lingvon, kaj li sukcesis.

(ii) La metio de la sciencistoj plej ofte estas analizado kaj dissekcado, sed ne kreado. La monstro de Frankenŝtajno estas trafega metaforo pri ilia krea kapableco . . . Mi tute ne dementas la sciencojn kaj ties rolon en nia mondo; sed necesas rekoni iliajn limojn. Tiuj interlingvistoj, kiuj "science" aliris la problemojn, estas ĝuste tiuj, kiuj ne sukcesis – ĉar fundamente ili ne celis – enblovi la vivon en sian kreitaĵon. Aliflanke ankaŭ Schleyer, kiu ja sukcesis vivigi dum mallonga tempo sian lingvon, estis la verkinto de versaĵoj (en la germana).

Pro tio la karaktero de Zamenhof estis ĝusta por la tasko, kiun li starigis al si. Ĝi postulis antaŭ ĉio poeton kaj ne sciencisto n.

Kaj certe al neniu sciencisto venus en la kapon starigi tiun ĉi deksesan regulon, kiu ebligis kreadon de la sonore belaj versoj de la esperanta poezio kaj la formfidelan tradukadon el alilingvaj literaturoj, kiuj estas – aŭ devas esti – fieraĵo de la esperanta lingvo.

JUBILEA ESPERANTO-MONUMENTO EN GRAZ

Belega skulptaĵo "La Espero" de la dana renoma skulptisto Jesper Neergaard, filo de D-ro Paul Neergaard, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, estos starigita en Graz (Aŭstrio) kaj inaŭgurita dum la Jubilea Esperanto-Konferenco. Sian krean artan inspiron kaj laboron J. Neergaard donacos. Restas tamen la efektivaj kostoj. Laŭ la nunaj prezoj ili estos minimume 100,000 danaj kronoj. La urbestraro de Graz donos subvencion de 50,000 aŭstriaj ŝilingoj, t.e. proks. 23,000 danaj kronoj, kaj members of N.E.M. jam promesis similan sumon. Do, necesas havigi ankoraŭ minimume 54,000 dkr. Ĉiuj, kiuj deziras finance kontribui por starigo de la monumento, sendu sian ĉekon al Prof. D-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF. Ne forgesu mencii, ke la sendita sumo estas donaco por la "Jubilea Esperanto-Monumento".

NEKROLOGOJ

George E. **Munn**, multjara membro de la E-Societo en Sheffield kaj kasisto de la societo, forpasis la 7an de septembro 1985 je aĝo de 84 jaroj. Dum la 1920-jaroj li studis Esperanton kaj gajnis la diplomon de BEA. Li regule ĉeestis la kunvenojn de la Sheffield-societo. Li laboris plejparte kun publika pasaĝera transporto. Li estis diligenta leganto kaj interesiĝis pri poemoj. Du filoj de s-ro Munn fariĝis magistratanoj kaj laŭvice Lordurbestroj de la urbego Sheffield.

William **Longton**, Corfe Mullen, Dorset mortis dum Julio. Ano de EAB/BEA de post 1968, iama ano de la Esperanto-Grupo en Accrington, Lancs. kaj poste ano de la grupo en Bournemouth, loka reprezentanto por EAB kaj fidela kursgvidanto perpoŝta. Kondolencojn al lia edzino kaj geamikoj.

ESPERANTO-ŜOKO, KAJ KONTRAŬ-ŜOKO

Historia Skizo pri la Esperanto-Movado en Irano: 1910-1984

La historion de la Esperanto-movado en Irano oni povus dividi en kvar partojn:

I. 1910-1935: Post la Konstitucia Revolucio en Irano

La unua ondo de la irana Esperanto-movado ekkomenciĝis per iu dupaĝa artikolo, nome "La Nova Lingvo – Esperanto", kiu aperis somere de 1910 en monata revuo BAHAR ("Printempo", 2a eld., 1321 H./1942, p.428-429). La revuo mem estis unu elstara frukto de la Irana Konstitucia Revolucio (1906). La verkinto de la artikolo, Jusof Etesam-ol-Molk (1874-1937), hazarde estis la patro de la tre respektinda poetino irana, Parvin Etesami (1916-1941). La iniciato de Esperanto pere de tiu avangarda intelektulo kaj la revuo mem, grandparte impresis, kaj influis la mensojn de la tiamaj iranaj kleruloj tre favore al Esperanto.

La unua lernolibreto perslingva aperis en 1915. Iom post iom formiĝis la unuaj klopodoj de irananoj vigligi la iranan movadon de Esperanto. Organiziĝis Esperanto-kursoj, fondiĝis ligoj de Esperanto en Tehrano, Tabrizo, Raŝto kaj Arako, aperis novaj lernolibretoj, vortaretoj, kaj tradukoj. Tiel, la frua movado daŭris dum 25 jaroj ĝis 1935.

En sia unua ondo, Esperanto en Irano ekburĝonis, sed bedaŭrinde ne fruktodonis. La antaŭmondmilita atmosfero malhelpis ankaŭ la evoluon de Esperanto en tiu lando.

II. 1935-1975: La Malhela Periodo por Esperanto

Grandparte, kun la leviĝo de Nazireĝimo en Germanio, ankaŭ tiama pornazia eksreĝo, Reza Pahlavi (1875-1942), malpermesis Esperanton kun diversaj stigmatoj kaj akuzoj – interalie, ke la lingvo estas la propagandilo de Bahaanoj, do anti-islama! Ĉar ankaŭ kelkaj tro entuziasmaj Bahaanoj – kompreneble ne ĉiuj – malatente al (a) la tut-enda neŭtraleco de Esperanto, aparte en la Tria Mondo, kaj (b) la ĝisfunde religia sinteno de la plejmulto el iranaj islamanoj, faris – kaj ankoraŭ faras – tion! Vole-ne-vole, ili disponigis al la diktatora, pornazia kaj ŝajn-islamo-subtena registaro tiama ĉian ajn pretekston por kondamni Esperanton. La nigra ombro de tiaj venenaj antaŭjuĝoj ankoraŭ sufokante restas kaj forte malhelpas la esperantistojn; ekzemple, en 1982, dum ĉio ĝuste ŝajnadis favora al Esperanto, kaj eĉ la Ministerio pri Edukado jam dissendis rekomend-cirkuleron pri la lernado de IL, subite iu nekonata fantomo malfermis malice sian konspiran dosieron delonge jam forgesitan, kaj alsendis fotokopion de iu bahaana propagandilo, kun priesperanta rubriko de 1916, al la Ministro de Edukado, demandante lin: "Ĉu vi estas la Ministro de Islama Revolucio, aŭ Bahaisma subtenanto?". La fotokopio, kvazaŭ eksplode, funkciis, ekellasis ĉenreagan kontraŭ-ŝokon kontraŭ Esperanto! Neantaŭpensebla bremsego de antaŭ 65 jaroj agis kun revolucia febro denove anti-movade! Tranokte Esperanto ŝajnis io tabua, kontraŭrevolucia, komploto cionisma kaj bahaisma. Eĉ, nura simpatio al Esperanto fariĝis vivdanĝera!

Tiel la misutiligado de Esperanto, kiel propagandilo en la manoj de kelkaj maldiskretaj ekstremistoj inter la anoj de iu religia kredo, kontraŭ la kredo de plimulto de islamanoj, ege bedaŭrinde aŭtunigis la verdan printempon de Esperanto en sia dua ondo en Irano.

Aliflanke, la konsekvencoj de la ĝenerala krizo de la Dua Mondmilito mem kontribuis baldaŭ, ankaŭ en Irano, al stagnado ekonomia, socipolitika kaj kultura. Plene regis malordoj, kaj malesperigaj kondiĉoj en la milit-okupita lando pere de la aliancitaj povoj. La movado ĉesis komplete dum 40 jaroj!

III. 1975-1979: Antaŭ la Islama Revolucio

La tria ondo de la irana Esperanto-movado komenciĝis en 1975 – denove per publikado de iu 33-paĝa priesperanta artikolo en la revuo de la Tehrana Universitato – "La Disfalo de la Babela Turo: Homo, kaj Lingva Revolucio" (Daneŝkade, n-ro 2, p.115-148, printempo, 1354 H./1975). La aŭtoro de la artikolo estis M.H. Saheb-zamani, universitata profesoro, membro de la fakula komitato pri mensa higieno de Monda Organizaĵo de Sano ĉe UN, verkisto, kaj radio-preleganto pri junulara problemaro, dum 6 jaroj po 3 programoj ĉiusemajne. Kaj tiel Esperanto renaskiĝis denove en Irano (E-o, okt. 1975, p.174).

Li, Prof. MHSZ, kiel intime kaj Esperante oni nomas lin, komencis sian agadon, unuapaŝe diskonigi Esperanton tutnacie: "Kiel eble plej multaj homoj havu iom da scio pri kaj de Esperanto" (E-o, dec.1977, p.207). La strategion priservis sufiĉe bone la jenaj taktikoj:

(1) Publika klerigado per amaskomunikiloj, kaj ankaŭ per paroladoj, plejeble diversloke, en la ĉefurbo kaj en aliaj urboj.

(2) Eldonado de libroj pri E-o perslingvaj, kiuj reeldoniĝis kelkfoje.

(3) Eldonado de lernmaterialoj. En 1975 ankoraŭ neniu Esperanta lernilo ekzistis en Irano (E-o, nov.1975, p.197). La baza lernolibro de Prof. MHSZ, dum 8 jaroj ĝis 1984, jam 7-foje reeldoniĝis (entute en 52,000 ekz-eroj).

(4) Instruado de la amasaj kursoj de E-o diversnivelaj al diversaĝaj kaj diversprofesiaj partoprenantoj. Okaze de la senprecedenta interesiĝo pri E-kursoj, en Universitato de Tehrano oni eĉ oficiale deĵorigis du oficistinojn por administri la kursojn por miloj da studemuloj (E-o, dec.1977, p.205).

Dum nekredeble mallonga tempo, E-o jam fariĝis dise konata en Irano, kiel la plej dezirinda dua lingvo. La Universitato de Tehrano, neantaŭvideble, funkciis kiel la centro de la gvidado kaj organizado de la landa movado. Dum la furoro de E-o landskale, komenciĝis sinsekvaj petoj kaj invitoj pri Esperanto-instruado. Responde al tiu arda bezono Prof. MHSZ komisiis al siaj kompetentaj lernantoj aranĝi diversloke E-kursojn. La E-agado etendiĝis al multaj universitatoj, fakultatoj, kolegioj, lernejoj kaj kluboj tra la tuta lando.

IV. 1979-1984: Dum la Islama Revolucio

Ĉi-periode, Esperanto-movado spertis tri fazojn rilate al la t.n. revoluciaj instancoj de la lando:

(a) *Tre, aŭ eble eĉ tro favora revolucia sinteno al Esperanto*. En 1979 ekflamis la fajro de la islama revolucio. La juna Esperanto-movado, kune kun la irana popolo, travivis la krizoplenajn tagojn de la reĝimoŝanĝiĝo en la lando. Post la fondiĝo de la Islama Respubliko en Irano (feb.1979), kaŭze de la revolucia furoro, kvazaŭ eksplode, kaj haste, ankaŭ la Esperanto-movado denove ekprosperis en Irano. La socipolitika neŭtraleco, kaj la kontraŭdiskriminacia karaktero de la lingvo Esperanto, estis mem favoraj faktoroj fari ĝin des pli bonvena kaj alloga al la revolucia Irano. La Esperanto-movado tiutempe konservis sian malnovan komencpaŝan strategion: diskonigi kaj dislernigi Esperanton, kiel eble plej vaste, t.e. konsideri ĉefe la amaskvanton. Denove, organiziĝis E-kursoj kaj aranĝoj, ĉifoje ne nur kadre de la fakultatoj kaj lernejoj, sed ankaŭ en multaj moskeoj (EPĈ, 7.1982, p.16; HdE, 5.1982, p.2).

En 1979, en la sociologiaj lernolibroj de la iranaj gimnazioj aperis ĉapitroj, entute 25 paĝoj, subtitole "Kulturo kaj Lingvo" pri Esperanto, verkitaj de Prof MHSZ. La librojn legis pli ol 1,5 miliono da gelernantoj, kaj konatiĝis kun Esperanto (E-o, dec.1979, p.202/marto 1980, p.56). Sekve, dekmiloj (entute ĉ. 80,000) da petleteroj, skribrulaĵoj, eĉ telegramoj, alfluis al la Ministerio pri Edukado tra la tuta lando. Resume, ili petis, ke post tia revolucia paŝo pri prezentado de Esperanto en la lernejoj, oni

faru la duan paŝon: "Oficialigu Esperanton en Irano, kaj dissendu instruistojn por ĝia instruado"!

Tiu landvasta postulo, en la tre malfacila komenca tempo de la revolucio, fariĝis granda kultura ŝoko por la plimulto de la funkciuloj. La lernopetoj multis, sed la eblecoj mankis. Oni petis konsilon de Prof. MHSZ. Tiam li prezentis sian planon solvi la problemon jene:

". . . Dum la somero, la Ministerio disponigu al ni 300 aŭ 500 geinstruistojn el diversaj partoj de la lando. Ili povus partopreni intensajn kursojn de E-o dum tri monatoj . . . Post tri monatoj, ni elektos 100 el ili, la plej sukcesajn. La aliaj 400 lernigos E-on en la lernejoj ekde la nova lernojaro. Ĉiuj el tiuj 100 elektitaj, kunlabore kun ni, ekinstruos la lingvon al 100 aliaj geinstruistoj. Ili lernigos 4-hore ĉiutaga, sed vespere dum unu horo ili venos al ni diskuti la problemojn, spertojn de ĉiutaga instruado kaj la morgaŭan programon. Tiele, dum alia monat-trio, ni povus disponigi al la Ministerio ĉ. 10,000 Esperanto-geinstruistojn. Poste, ni povus elekti inter ili 500 aliajn, kaj denove ĉiu el ĉi-lastaj gvidos aliajn 100-personajn kursojn. Do, post alia trimonata periodo ni disponus pri 60,000 E-geinstruistoj." (El la letero de Prof. MHSZ al ĈEL, Ĉinio, je 3.3.1983).

La propono volonte akceptiĝis. La Ministerio pri Edukado dissendis cirkuleron (je 22.4.1980) al la mezlernejoj tutlanden kaj invitis la instruistojn pri fremdaj lingvoj kaj sociaj studoj partopreni en E-kursoj. La intensaj kursoj sub la gvidado de Prof. MHSZ kaj liaj kolegoj okazis en la iama klubo de usonanoj en Tehrano, somere de 1980. Entute 675 geinstruistoj lernis instrui E-on (E-o, okt.1980, 161-163/HdE, 1, 1981, 1). Bedaŭrinde tiu plano ĉesis pro la milito inter Irano kaj Irako, kaj aliaj neantaŭviditaj dumrevoluciaj malfacilaĵoj en la lando (kiel supre menciita alsendo de la fotokopio de bahaana propagandilo al ministro pri edukado).

Ĉifaze, Esperanto ankaŭ en Irana gazetaro jen kaj jen prezentiĝis glore kaj atentokapte, kiel iu grandioza kultura fenomeno, harmonia al la plej respektindaj ideoj de la ĵus liberiĝinta Irano. Apenaŭ troviĝis ĵurnalo aŭ revuo, en kiu oni ne prilaŭdis Esperanton en ampleksaj kaj ilustritaj artikoloj!

Inter la plej sukcesa gazetara agado ĉiperiode menciindas tiu de la populara semajna revuo "Ĝavanan" (Junularo). Dum ĉ. 1,5 da jaro la revuo sinsekve publikigis E-paĝon, nome "Lernejo de Esperanto". Sur tiu paĝo, krom la regulaj lecionoj de E-o, aperis diversaj sciindaĵoj, kaj informoj pri la landa kaj monda E-movadoj. La revuo ankaŭ rolis kiel bona ponto inter la disaj simpatiantoj kaj lernantoj de E-o, kaj la centro de la movado en la ĉefurbo. Iusence, per tia servigo de tiu populara nacilingva revuo, la irana E-movado ŝparis la superbezonajn elspezojn, mem eldoni apartan periodaĵon kun limigita legantaro (E-o, dec.1981, 209).

Somere de 1980 okazis i.a. la t.n. Kultura Revolucio en Irano. Por ĉ. 3 jaroj ĉiuj universitatoj de Irano fermiĝis. Sekve, la E-agadoj ankaŭ tiuteritorie devis ĉesi. La kursoj limigis sin je la lernejoj kaj moskeoj.

Malgraŭ la komenciĝo de milito Iraniraka, septembre de 1980, Prof. MHSZ sukcese organizis kaj gvidis la sepmonatan E-kurson kun la finekzameno por oficiroj de la irana aerarmeo (E-o, majo 1981, 97).

Somere de 1981 oni instalis la Iran-Esperanto-Domon por pli koncentri la disajn agadojn, pli interkunigi la esperantistojn en Irano, kaj plifaciligi la internaciajn kunlaborojn. La Iran-Esperanto-Domo jam funkciis kiel vigla centro de la movado. Tie okazis E-kursoj, aranĝoj, paroladoj, festoj, kunvenoj kaj movadaj kunsidoj. Aldonendas, ke la Esperanto-Domo subteniĝas de helpoj kaj kotizoj de siaj instruantoj, lernantoj kaj aliaj simpatiantoj de la E-movado.

(Finota)

LAŬ MIA OPINIO . . .

Moŝtaj salutoj

Kvankam la ricevo de "aprobaj" leteroj de eminentuloj havas dubajn valorojn, mi ne opinias, ke ni devas forĵeti ilin. Antaŭnelonge mi spertis ekzemplon de la bezono gajni tiaspecajn "aprobojn".

Je la fino de julio mi akompanis grupon da skoltoj al la 75-jara jubilea ĵamboreo de la nederlanda skoltmovado ĉe Apeldoorn (norde de Arnhem). La ĉefa gasto kaj prelegisto dum la malferma ceremonio estis la Ministro pri Kulturo, Bonfarto kaj Publika Sano, S-ro Brinkman (sufiĉe bonaspekta kaj juna viro). Tamen, dum la tuto de lia prelego okazis kontraŭkrioj kaj sifloj. Fakte, la loka ĵurnalo titolis artikolon pri la malfermo tiel: "Siflanta koncerto salutas 'popularan' aferulon".

Nature, mi estis iom mistifikita pri lia malakcepto ĉe la gejunuloj, kaj demandis al la nederlandaj skoltestroj de nia gastiganta grupo pri la afero. La kialon de la malaprobo mi ne rakontas (ĝi koncernis la televidon), sed kiam mi plue demandis kial inviti eminentulon, kiu klare ne posedas la bonvolon de la ĉeestantaro, ili donis al mi tre trafan argumenton!

Sen la ĉeesto de aferulo la gazetaro, la radio kaj la televido ne farus mencion pri la evento! Tio spite al la fakto, ke la evento mem estis internacia kun ĉeesto de 8,000 gejunuloj kaj estroj el 20 landoj.

Ĉu ne estas leciono ĉi tie por la Esperanto-movado?

David Withey

Is it fair?

Kiel respondi al sinjoro Rossetti? Sed kiel ne respondi al li?

Sinjoro Rossetti pravas kiam li diras, ke en la franca vortaro troviĝas 'loyal' en la senco de la angla vorto 'fair', kaj, ke ĝi jam aperis esperante en unudu verkoj far francaj aŭtoroj. Mi dankas pro tiu informo, ĉar sen ĝi mi vane kaj poreterne serĉus en miaj English-Esperanto vortaroj. Ĉu homoj en Ĉinio, ekzemple, ankaŭ venas al 'lojala' per franca vortaro? aŭ hazarde en Rajmondo Ŝvarca verko de 1928?

Kompreneble, se temas pri hazardo, oni povus, kun la tempo ektrovi 'lojala' en PIV., (kosto £38.00 proksimume: [do lojala prezo]). Tie, sub la 2-a senco, ĝi ja staras: "aganta konforme al tio, kion postulas la honoro, sincereco, fideleco al la promesoj", kun ekzemplo: "aranĝi lojalajn elektojn". Kial sinjoro Rossetti dubas se mi ". . . fakte kaj nun bezonas tiun esprimon"? Mi estas certe ne la sola esperantisto, kiu opinias ĝin bezonata al taŭga mondlingvo. Tamen, en Butler 'Esperanto-English' vortaro (prezo £4.15 plasta bindaĵo, kaj £6.00 tolbindaĵo) 'lojala' staras nur en la unua senco, t.e. anglalingve 'loyal'. (Do, nelojalaj prezoj)

Sinjoro Rossetti plue pravas, kiam li diras ke eble mi volas verki ion kaj volas uzi tiun parolturnon. En 'fair' mi konscias, krom sencon de 'justo' esencon de belo. Pro tio, la malneto de mia artikolo nun komenciĝas per: "La 'cirkonstancoj' de nia mondo permesas la ekzistadon de 'Tria Mondo', pro kialoj ne logikaj, ne lojalaj, kaj tute ne beljustaj." kaj mi faros piednoton pri la dusenca 'lojala', laŭ PIV.

Intertempe, b.v. iu esperantigi por mi "a fair rate for the job", kiu estas temo tre aktuala. Ĉu 'lojala' taŭgas en tiu kazo, konsidere la promesojn k.t.p.?

Karolina Gilmore

Hazarde mi devis trifoje lastatempe traduki la vorton "fair". Mi dufoje tradukis per "lojal-", unufoje per "just-". – Red.

B.E. Sept-Okt 1985

La ĵusa LBE estas aparte interesa. Ĝenerale ĝi fojon plu demonstras vian neordinaran redaktoran kapablon, kaj detale:

Bonega recenzo/prezento de Lidia.

Kuraĝa kaj talenta atako de Rik Dalton al timinda traduktasko: Faithless Nellie Gray de Thomas Hood. Adekvate traduki ĝin ŝajnas neeble, do la provo ne atingis intenacian valoron; tial vi prave aperigis ĝin en LBE por esotera intereso de anglalingvanoj, kiuj do povos ŝati la libere spritajn solvojn de vortludoj kaj vorteĥoj el la originalo.

La letero de Phyllis Goodheir estas bonanima kaj kelkloke prava, sed de kie ŝi havas, ke 'all languages are artificial and contrived in their "youth"?' Tutsimple, ĉiuj lingvoj estas artefaritaj, alivorte artverkoj, ĉar la homo estas lingvofara animalo kaj la lingvo estas ĝia plej grava artverko. Kaj kial ŝi ripetas la tedan kaj nerealan pretendon, ke Esperanto havas 12.000.000 parolantojn?

Mi ĝojas, ke vi sukcesis logi D.B. Gregor recenzi Umar Kajjam. Li traktas ĝin funde kaj skrupule, kiel ĉiam.

Albert Goodheir malprave supozas, ke Diablet' en botel' estas nova traduko: ĝi aĝas plurajn jardekojn do certe antaŭas la tradukon de Vincent.

Sur p. 79, dua kolono malsupre, oni bonvolu korekti:

Anstataŭ: Fakte, Z. skribis "ankaŭ" ĉisence, sed neniam "per".

Oni legu: Fakte, Z. skribis ankaŭ "laŭ" ĉisence, sed neniam "per".

Reto Rossetti

Dafne Lister:
AL IU
(Post relegado de "Mia Spektro")

Eĉ ne paĝ', apenaŭ alineo;
Ne mondskua, tamen plaĉe flata.
Spontaneo
Natura,
Senspura,
Rememorata.

NOVAJ LIBROJ

Esperanta Antologio. Poemoj 1887-1981. Redaktis William Auld. UEA, Rotterdam, 1984. 887 p. Bindita.

La graveco de la poezio en la evoluo de Esperanto estas universale konata. Eĉ tiuj, por kiuj la poezio estas "ekstraĵo nebezonata en la vivo", scias, ke de la komenco Zamenhof verkis poemojn. La pra-Esperanta strofo de la 19-jaraĝa knabo, "Malamikete de las nacjes/Kadó, kadó, jam temp' está/La tot' homoze en familje/Konunigare so debá" ne povas ne tuŝi ĉiun Esperantiston.

La graveco de la poezio en la nacia literaturo estas ankaŭ universale konata. Ĝi estas la plej konciza formo de la esprim-arto vorta. La prozo analize esprimas aferojn per serio da unuoj kiel bidoj sur fadeno; la poezio per siaj pluraj rimedoj esprimas multajn aferojn sinteze, samtempe, tiel, ke ĉiu vorto, ĉiu silabo, produktas nesondeblajn eĥojn en la psiko. La plej ordinara faro aŭ objekto de la ĉiutaga vivo povas transformiĝi en universalan simbolon.

Prave, do, UEA decidis, ke la unua volumo de la Jubilea Jarkolekto por la Jarcento de Esperanto estu reviziita kaj ĝisdatigita eldono de la *Esperanta Antologio*. El la tuta poezia trezoro de la mondo – kaj ĝi estas jam nekredeble vasta – Auld elektis 706 poemojn de 163 poetoj, el 35 landoj, kaj el ĉiuj kvin kontinentoj, vere nur malgranda ono el la tuto.

La tasko de Auld estis sendube malfacila, ĉar, kiel antologiisto, li devis: (a) elmontri la evoluon de la Esperanta poezio; (b) ilustri la evoluon de la psikologio kaj filozofio, la vidpunktoj, de la Esperantistaro tie reflektitaj; (c) prezenti libron de veraj literaturaj juveloj, indaj je komparo kun tiuj de la naciaj literaturoj. (Laŭ la recenzanto li mirige sukcesis). Unu afero aparte notendas: por naciaj antologioj naciano elektas erojn surbaze sole de sia longa konado de la nacia kulturo. Ĉi-kaze, internaciulo devis koni la Esperantan

literaturon de la tuta mondo, kaj kompreni ĝiajn bazajn modelojn. Se komence la modeloj estis evidente okcident-eŭropaj (la japano Ossaka Kenĵi – nask. 1888 – verkis laŭ eŭropaj modeloj), tamen poste la orientaj kaj aliaj enfluriveroj verŝis sian unikan akvon en la universalan riveregon.

Auld modifis sian analizon de la unua eldono, nun rekonante kvar "stadiojn": 1887-1921, primitiva romantismo; 1921-1931, matura romantismo; 1931-1956m parnasismo; 1956-1982, postparnasismo. Tiel li "heziteme" donas strukturon al la antologio.

Kortuŝe nun estas legi la fruajn poemojn de la volumo. "La Espero" de Zamenhof esprimas unu temon. Grabowski (nask. 1857) diras: "Tagiĝo, tagiĝo radias en rond'/La ombroj de nokto forkuras el mond'!", kaj: "Esper' sonoru al homar' do/Per rim' en teropartoj kvin!". Goldberg (Esperantiĝis 1889): "Novajn amikojn voku, amikoj,/La voko vana ne estos!". Frenkel: "Ankaŭ dum hor' de l' mizero./ Konsolas esper', kiu flamas". Tamen, eĉ tiam aŭdiĝis alispeca voĉo. Schulhof (nask. 1864) verkis "Desperanto": "Eĉ se iam jena tempo venos,/Post jarmiloj, kaj post miliardo,/Tiam ree homo batos homon,/Sed li batos lin en via nomo -/ Ankaŭ kun la stelo sur standardo". Redondo Ituarte (nask. 1882) verkis "La Misvojo": "Post densa mallumo ekzistas abismo,/ Al kiu la lingvo rapidas;" poemo, kiu kritikas la eternajn plendantojn de la movado: "Eĉ guto acida, falanta sen ĉeso/Doloras plej gajan la koron". Ĝis la lastaj paĝoj de la Antologio la du voĉoj aŭdiĝas pli malpli klare.

La gamo de poemoj en la libro verŝajne ampleksas ĉiun eblan temon por la poeto, kaj ankaŭ ĉian stilon. Elekti ekzemplojn, kaj esti justa al ĉiu kontribuinto, estas evidente neebla. Inter la hajkoj de pluraj japanoj mi ĝuis de Murata Keinosuke: "Sub jeto zuma/ balaas nun neĝkoton/ mi malvarmuma." (Brile!) Kaj de Yamada Tempu – ĉar ĝi koncize esprimas por mi ion unike Esperanto-kulturan: "Jam gast' lontanas;/ min kun verk' kaloĉaja/ la suno banas."

La libro enhavas ion por ĉiu: longajn poemojn (nu, almenaŭ *parto* de La Infana Raso!) romantikajn kaj klasikajn, severformajn kaj liberformajn, kun kaj sen rimo. La amo, la vivo, la homaj rilatoj, la hejmo kaj la tuta mondo, la intimaj sentoj kaj la publikaj deklamoj, kaj multe da aliaj temoj, troviĝas.

Kaj la lingvaĵo! Se iu volas kompreni ĝuste *kia* lingvo estas Esperanto, jen por tiu la libro. Ĝi indas la penon legi ĉion en ĝi, kaj ĝi provizas riĉegan stokon da poemoj indaj je deklamado en kunvenoj kaj koncertoj. (Ne ĉiu bona poemo estas "malfacila"!)

Unu karakterizaĵo de la poezio estas, ke ĝi venas el la intimaj sentoj de la poeto. Li aŭdiĝas kaj vidiĝas sen masko. Ĉi tie japano, rumano, brazilano, sudafrikano, maltano, israelano, greko, islandano – kaj aliaj – rekte parolas. Ĉiu alia tielnomata "Antologio de la Tutmonda Literaturo" falsas, ĉar ĝi devas esti nura fasko da tradukaĵoj. Kontraste, ĉiu poeto de la *Esperanta Antologio* verkas en la sama lingvo, kaj la enloĝantoj de kvin kontinentoj lin komprenas per la sama lingvo.

La *Esperanta Antologio* estas mondvasta, mondampleksa. Teni ĝin en la mano estas ne nur plezuro, ĝi estas privilegio.

Don Lord

Mia Spektro de Nikolao Kurzens, kun enkonduko de William Auld kaj biografiaj notoj pri Kurzens de Mirzda Burgmeister.

Eldonis Esperanto-Rondo de Toronto. Mendebla de: K. Smilga, 34 Martin Road, Toronto, Ontario, Kanado. M4J 2R2.

Kiam mi Esperantistiĝis, mi baldaŭ renkontis verkojn de bone konataj poetoj, kiel Kalocsay kaj Baghy, sed kvankam mi admiris ilin, mi dum jaroj

supozis, ke nur la angla lingvo povas esti por mi vere elvokiva, ĉar nur la propra lingvo estas sufiĉe profunde enradikiĝinta por senpere trafi la animon. Kurzens estis por mi la ŝlosilo al la Esperanta poezio. Aŭdinte (aŭ eĉ aŭdante) la unuan fojon la poemon "Aŭtuna Elegio" mi kvazaŭ enamiĝis, kaj la tuta sinteno ŝanĝiĝis, mi tuj mendis la poemaron "Mia Spektro", kaj tiel montris prudenton ne ofta ĉe mi, ĉar poste ĝi estis dum jaroj nehavebla. Nun finfine ĝi reaperis, kaj estas por mi granda ĝojo bonvenigi ĝin.

La poezio de Kurzens estas esence poezio de etoso kaj humoro, Lia spektro ne estis vasta, sed intensa. Tiaj vortoj, kiaj 'bela' 'agrabla', 'ĉarma', aperas nur por esti forpuŝitaj, kaj la tono varias de poemo al poemo, foje eĉ en la sama poemo. Jen splena, jen sovaĝa, pli furioza ol malespera: "Esti Besto por Horo" "Ho" "Pro Kio?" Varias, de tenera realismo: "Al Iu" "Disigo" ĝis laca naŭzo. Kurzens ne verkis grandskale, li neniam kreis epopeon, li estis voco forte individua, kies vokon oni ne povas aŭdi sen koni la homon vokintan. Nun nova generacio havas la okazon koni Kurzens la neforgeseblan, kies deziro: "pasu mia viv' kaj ĉesu – sen postlas' de ia spur'" feliĉe ne plenumiĝis.

Aldone al "Mia Spektro" aperas tradukoj de aliaj latvaj poetoj far Kurzens, kaj tradukoj de latve verkitaj poemoj de Kurzens far Elvira Lippe. Interese estas konstati, kiajn poemojn Kurzens elektis traduki, kaj la elekto ne estas miriga: "Kaj frostas, frostas mi ĉe l' cindre pala

Kaj abomene fuma vivruin!"

Vilis Plü-donis.

Eĉ en tradukoj la voĉo de Kurzens aŭdiĝas. Bedaŭrinde, en la latvaj poemoj tradukitaj de Elvira Lippe, tiu voĉo estas nerekonebla. Pri la kialo, mi preferas ne konjekti, ĉar konjektoj povus esti maljustaj, kaj konkludo neeblas. Ankaŭ bedaŭrinde estas, ke enrampis preseraroj: p.27 "ja nenion" devus teksti "ja nenio" (Mi Rapidas tra la Vivo) p.32 "Se jam morti", ne "sed' (Al la Sorto).

Etaj makuloj, sed en poemoj, kie ĉiu vorto, efikas, des pli necesas, ke ĉiu vorto estu ĝusta.

Dafne Lister

Saluton al la Suno de Edwin de Kock. Aŭtoreldono, Honingnestkrans, Pretoria, Respubliko de Sud-Afriko; 1983.
La Konflikto de la Epokoj, libro I, de Edwin de Kock. Aŭtora eldono, ĉe Diadone, Honingnestkrans, Respubliko de Sud-Afriko; 1984.

Edwin de Kock ne estas poeto por komencantoj. Ilin senaplombigos liaj licencoj, neologismoj, nekonataj aludoj, koncizaj vortkunmetoj: "frol unua Kaina bastonbato . . ." Tamen, sendube dirus de Kock, la ritmo dancanta de "ekde la unua . . ." ŝanĝus netolereble la movon de la verso; eĉ skribi "fro l'unua" aŭ "frol' unua" ĝenus momente la okulon, dum "frol", unufoje komprenita, pasas nerimarkende. Kaj pri Kaino, dirus miaj unuaj instruistoj, se vi ne scias kiu li estis, vi devus scii!

La idiomo de Edwin de Kock estas lernebla. Oni kutimiĝos al la neologismoj kaj la mankantaj apostrofoj. Eĉ antaŭ ol kompreni, oni povas ĝui la sonharmonion: "dum respondas/la kor al ĉio dista kaj obskura". Relegante, post la helpo de la mallongaj notoj, oni rekonas la strangan belecon de ĉi tiu poezio densa, intensa, kvazaŭ la afrika suno.

De Kock parolas pri tiu suno kaj la beloj kiujn ĝi malkaŝas, "ĉiufenestra/ plenverŝo de matena or"; pri la suferoj de ĉiuj kiuj luktas sub la suno, "vundobruloj/de geviroj ŝiritaj pli profunden/ol pens aŭ sento"; pri la amo por ĉiuj kiun, infane, li spertis: "ĉar frue la okuloj lernis vidi/ne haŭtojn sed la homojn". Li parolas ankaŭ, malpli kompreneble por kelkaj, pri la simboloj kaj per la simboloj de la kristana religio: "Suda kruco . . . Ho vundoj antikvaj!" Jen misteroj de aparta kulturo, aparta tradicio, aparta koro, kiujn tamen de

Kock malkovras en universala lingvo, kiel ĉiu eminenta verkisto Esperanta.

Surprize, mi trovis pli alirebla, ol la liberversaj lirikoj, la epopean libron. La unua versio de 1961-7, kiun mi ne konis, nun multe reviziiĝis. Kial progresanto, kiu ŝatas sufiĉe aŭ la Biblion aŭ la modernan sciencfikcion, ne komencu per la *Konflikto de la Epokoj*? Forportate per la grandskala movo, mi ne rimarkis la licencojn. La aludoj ne estas kaprice konsternaj; ili estas la vefto mem de la verko.

De Kock rerakontas siamaniere la "tragedion de l'homo" laŭ *Genezo*, Miltono, Madach kaj multaj aliaj. Li esploras pli subtile ol Miltono la psikologion de Lucifero, kaj vidas pli plene la hororon de planedo ruinigata, "kun ve kaj vundoj de la tuta mondo". Ni devos atendi por vidi komplete kion de Kock faros pri la psikologio de Dio kaj de Kristo; ĝis nun aperis nur unu libro el kvin projektitaj. Mi atendos avide.

Katelina Halo

La Monto, István Nemere. Originala romano. Hungara Esperanto-Asocio. 166 paĝoj.

Komencinte legi la libron, jam de la unuaj paĝoj mi kredis ke mi legas romanon de Dino Buzzatti, ĉar ambaŭ aŭtoroj priskribas la ĉirkaŭaĵojn, la geografion, domojn, homojn nur nebule, sed pro la verkostilo, ni akiras klarajn mensajn bildojn, de Nemere pri la Monto en ĉi tiu verko, de Buzzatti, ekzemple, pri Fortikaĵo en "La Dezerto de la Tartaroj". Mi ne diras nek sugestas, ke Nemere imitas al Buzzatti. Tute ne! Estas la rekta, pragmatika stilo de ambaŭ verkistoj, per kiu la menso kunigas ilin. Sed mi lasu al Buzzatti kaj venu al mia tasko!

Majoro Reman estas sendita de liaj superuloj al la Monto-ni neniam legas la nomon-por trovi kio okazis al kvar soldatoj kiuj malaperis, aŭ dizertis, dum milito, direkten al la Monto. La loka impostisto, kiu konas la vojon kaj la montanojn, kiuj loĝas ĉe la supro, akompanas lin ĝis la pinto. La Majoro, jam en la vilaĝeto, komencas la esplorojn kaj sondas, pli-malpli delikate, la montanojn. La verkado kaptas tutplene la menson de la leganto, pro la intrigo de la romano kaj la poezieco de la prozo. Mia simpatio baldaŭ iris al la montanoj, kies simplan vivomanieron mi kredis minacita de la Majoro. Tiel forta kaj penetrema estas la verkado kaj tiel lerta la intrigo ke nur inertulo povas legi la libron kaj resti netuŝita. Intence mi ne klarigas la intrigon, ĉar la antaŭscio de la eventoj en la romano mortigos la plezuron de la legado sekvanta la lertan evoluon de la okazintaĵoj.

Neniam antaŭe mi legis tiel belan priskribon por intima, ama momento kiel "*Poste pinto de vulkano elfalas el sang-ora suno, fajroriverego fluas, vivlafo eksplodas el korpo en korpo, vivmilionononoj kuregas en siaj glithumidaj tuneloj*". Aŭ kio pri frumatena sento: "*Sur ŝiaj larĝaj vangostoj sidis ankoraŭ la varmo de la lito*". Abundas similaj esprimoj kiuj montras la verkokapablon kaj lingvoregon de Nemere.

Evidentiĝas jam mia entuziasmo por la verko, do iuj homoj opinios min iom tendencofavora kiam mi asertas ke "La Monto" estas inter la plej elstaraj romanoj en Esperanto. Pri la aŭtoro mi scias nenion. En la libro aperas foto de li, sed eĉ ne unu vorto pri li. Mi opinias ke ĉi tiu libro estas lia unua romano.* Se jes, mi avide atendas la duan. Se mi eraras, mi atendas pluan. Bona lingvo ĉiam estas facila por kompreni, pro tio mi forte rekomendas la libron al progresantoj kaj eĉ mezklasuloj. Al ĉiu leganto ĝi donos la plezuron kiun oni ricevas de bona romano bele verkita!

Amador Diaz

* *Efektive ĝi estas lia sesa romano en Esperanto. – Red*

Kvin Noveloj de Friedebert Tuglas. El la estona lingvo tradukis Henrik Seppikk. La antaŭparolon verkis August Eelmäe. Formis kaj ilustris Ivi Raudsepp. Eldonejo "Eesti Raamat" Tallin, 1984.

Tiu ĉi libro ne estas tipe estona, kiel

aliaj recenzitaj, eble ĉar la aŭtoro ekziliĝis de 1906 ĝis 1917, kaj loĝis en multaj eŭropaj landoj. Certe al la noveloj mankas la etoso de solida realismo, kutima en la estona literaturo. La unua, "En la Fino de la Mondo" estas verko de potenca fantazio, kiu kulminas en delira teruro.

Bova, protagonisto de "La Ĉielaj Rajdantoj" estas mizere malriĉa knabo, kiu senradike tramigras multajn landojn. Tiu dua novelo ne estas fantazia, sed havas la saman, febran senton, kiel la unua.

Popi kaj Huhuu estas rakontita laŭ la vidpunkto de hundo, kaj estas atingo vere rimarkinda. "Lau la vidpunkto de hundo" sugestas ion naŭze sentimentalan, sed Popi kaj Huhuu estas novelo peze malhela, realisme efika per kombino de observado kaj imagpovo, simbole efika, kiel alegorio pri la rilato inter regato kaj reganto.

Jürgens, protagonisto de "La Ora Ringo" iel memorigas min pri la Dikensa persono Skruĝ, tamen Skruĝ fine vekiĝis kaj savis sin, sed el la koŝmaro de Jurgens neniu vekiĝas.

"Miraĝo" montras la amaran realon de ŝajne dolĉa medio.

Entute, impona kolekto, sed mi ne povas ne senti la mankon de karakterize estonaj humuro kaj prudento.

Dafne Lister

Revuo "Balkana laboristo" – Tribuno kaj organizanto de laboristaj esperantistoj en Bulgario (1929-1931), de Dimitar Papazov. Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1983. 58p. Inter la du mondmilitoj la laborista Esperanto-movado ludis gravan rolon en la tiamaj politikaj cirkonstancoj, kaj iam meritos seriozan studadon de la historio. Tiu ĉi broŝuro alportas valoran atestaĵon pri tiu periodo.

MALLONGE

En la nunjaraj Belartaj Konkursoj de UEA, du britoj premiiĝis. La unuan premion en la branĉo Poezio ricevis Timothy Brian Carr por "Vagonvojaĝo", kaj la duan premion en la sama branĉo ricevis Karolina Gilmore por "Kaŝĉambro". Karolina ricevis ankaŭ la duan premion en la branĉo Dramo, por "Tepaŭzo". Gratulon al ili!

* * *

La 29a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo kaj Germana Esperanto-Asocio okazos en Eschwege, FRG, de la 27a de decembro 1985 ĝis la 4a de januaro 1986. La temo estos "Akvo, savinda kaj savenda". Kiu emas partopreni, tiu skribu al: Wilfried Hinrichs, Zellbach 6, Klepperberg, D-3392 Clausthal-Zell FR Germanujo.

* * *

Aŭstralio – granda insulo inter Pacifika kaj Indiana Oceanoj, bonvenigos Esperantistojn ĉe Kongreso en 1986. La Kongreso estos ĉefe por Aŭstralianoj sed la ĉeesto de Esperantistoj el aliaj landoj interesos aŭtoritulojn en la fakoj de informado, politiko, kaj edukado.

En PERTH.

Faru demandojn al Aŭstralia Esperanto Asocio.

* * *

A group excursion has been arranged to the *BUDAPESTA VINTRA FERIO*. Activities will include Opening and Farewell Parties-Sightseeing excursions – All Night New Year's Eve Ball. This annual holiday has been held for 16 years and is now quite famous. People come from many different countries. Depart London-Heathrow Saturday December 28th. The holiday finishes on Thursday January 2nd. All-inclusive cost £225.00. It is possible to stay on and do sightseeing in Budapest (a beautiful city) for extra days for £5 a day for B & B.

Send S.A.E. for further details to Esperanto Holidays Association, Nacton, Ipswich IP10 0JZ.

Kastelo "Gresillon" has always been difficult to reach by public transport. Therefore in the summer of 1986 a minibus trip will be run there. It will involve only overnight ferry with cabin berth Portsmouth-Le Havre and then a 5 hour road journey.

* * *

Internacia Jura Revuo aperas du fojojn jare kun riĉa kaj varia enhavo, ĉefe en la sferoj de jura teorio, kompara juro kaj internacia juro. Ĉiu kajero havas 48 paĝojn. Kvankam sur alta faka nivelo, tamen, laŭ la prezentmaniero de la temaro, la stilo estas populara kaj facile komprenebla por ĉiu iom interesita klera esperantisto. La membroj de IEAJ (jara kotizo 150 aŭstraj ŝilingoj) ricevas la revuon senpage, sed IJR estas abonebla ankaŭ ekster la membreco. La abonkotizo estas same 150 ŝilingoj jare. La aliĝojn, abonojn kaj kotizojn akceptas la sekretario-kasisto de IEAJ, samtempe redaktoro de IJR, *D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio, poŝta ĉekkonto n-ro 1257.845.*

* * *

Internacia Biblio-misio: – Alvoko al *pliaĝuloj*!
Mi urĝe bezonas aĉeti minimume tri ekzemplerojn de "Esperanto Grammar and Commentary", verkita de Cox. Ĉu iu povas vendi bonordan ekzempleron? Brook, 29 Plantation Road, Poole, BH17 7LN.

ANONCETOJ

5p por ĉiu vorto. Minimume 20 vortoj. Antaŭpagenda.

Free introductory course: All tutors of the Course should send names and addresses of all students to Anny Lawson, E.A.B. Membership Recruitment Campaign, 22 Fortismere Avenue, LONDON, N10 3BL.

Press Panel: Please send all cuttings on Esperanto or the language problem *immediately* to Kate Millard, 18 Stirling Road, Brislington, BRISTOL, BS4 3PD.

Local Representatives: If you wish to become a Local Representative of EAB, please contact Muriel Shackleton, 3 Northdale Mount, Bradford, West Yorkshire, BD5 9AP.

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) celas eduki homojn *per* Esperanto al racia pensado por faciligi rilatojn inter la laboristoj de la mondo. Informiĝu ĉe: SAT en Britio, 29 Farrance Road, Chadwell Heath, ROMFORD, Essex, RM6 6EB.

Volas korespondi:

Korespondantojn deziras (kaj lernantojn) por Esperantistoj en aliaj landoj (S.A.E.): John H. Mathews, 118 Rimbleton Avenue, Glenrothes, Fife, KY6 2DP.

Dusio Luigi, Via A. Certosa n.13, 14100 Asti, Italujo filatelisto-Esperantisto volas interŝanĝi p.m. 65-jara pensiulo.

KOHÁRI Katalin, Fürst S.u. 41/a, 2220 Vecsés, Hungario, 20-jara knabino kun anglaj gejunuloj. Ŝatas legi, danci, foti. Interesas muziko, floroj kaj modo.

Livia SAMU, Kaposvar Koppany Vezer u.16, 7400 Hungario lernantino de Esperanto volas korespondi kun gejunuloj 13/16-jaraĝaj en Britujo.

Jurek O' EKSIEWICZ, 18-jara student en elektronika teknikumo volas korespondi kun junaj gebritoj. Hobioj estas Aŭstralio, Esperanto, informatiko, muziko, fotado, filatelio, filmo, vagado kaj numizmatiko.

13-jara lernanto volas korespondi pri sporto, turismo, moderna muziko, kolektas p.m. prospektojn, komiksojn (bildstriajn gazetojn?) Piotr RUTA ul.Za-wadzkiego 12/20 *63-100 Strem*, Pollando.

Juna lernanto en IRAN volas korespondi. Behrooz Derakhshan, Poŝtbox 46411, Padegan, Agabshire Azarhaygan, Shargi, IRAN.

Barbara DELEKTA, 38-jara instruistino, deziras korespondi en Esperanto kun anglinoj pri ĉiuj temoj. Interŝanĝas bildkartojn, kasedojn, p.m., diapozitivojn, modrevuojn kaj muzikdiskojn. Adreso: ul. Zawadzkiego 6/36, PL-96-100 SKIERNIEWICE, Pollando.

Monika MIKO, 16-jara hungara lernantino volas korespondi kun anglaj geknaboj. Kolektas p.m. kaj bildkartojn. Interesoj: moderna muziko, literaturo, sporto kaj la modo. H-3910 TOKAJ, Fojef A.g. Hungario.